

Joseph Freiherr von Eichendorff,

## Migrado

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kantadas enaere  
Alaŭdoj, riveret'  
Susuras kaj leĝere  
Ekmigras la poet'.

De l' valo ĝis la monto  
Floradas ĉio ĉi,  
Kaj al la horizonto  
Migradi volas li.

Li vokas ĉiujn, kiujn  
deprimas la zorgad',  
Persvadi volas tiujn  
Al tiu ĉi migrad'.

Li kantas, la kantadon  
Ekaŭdas kelka vir',  
Kaj kelkan kamaradon  
Ekkaptas hejm-sopir'.

La tuta mond' vigliĝas,  
Ekmigras kun pasi';  
La amatin' aliĝas,  
Al li mansvingas ŝi.

...

Joseph Freiherr von Eichendorff,

## Wanderschaft

Vom Grund bis zu den Gipfeln,  
So weit man sehen kann,  
Jetzt blüht's in alle Wipfeln,  
Nun geht das Wandern an.

Die Quellen von den Klüften,  
Die Ström' auf grünem Plan,  
Die Lerchen hoch in Lüften,  
Der Dichter frisch voran.

Und die im Tal verderben  
In trüber Sorgen Haft,  
Er möcht' sie alle werben  
Zu dieser Wanderschaft.

Und von den Bergen nieder  
Erschallt sein Lied ins Tal,  
Und die zerstreuten Brüder  
Faßt Heimweh allzumal.

Da wird die Welt so munter  
Und nimmt den Reiseschuh,  
Sein Liebchen mittendrunter,  
Die nickt ihm heimlich zu.

...

Ek-iras homoj ĉie  
 jubile, kun kantad',  
 Ĉi tie kaj jen tie -  
 Nun ekas la migrad'!

Und über Felsenwände  
 Und auf dem grünen Plan,  
 Das schwirrt und jauchzt ohn' Ende -  
 Nun geht das Wandern an!

*Traduko de la Germana poemo "Wanderschaft" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-05-19.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 – †1857-11-26).*

*Arg-229-451 (2004-04-23 10:30:47)*

*MR-096-1 / Arg-229-452 (2004-04-23 10:38:25)*